| | |
|---|---|
| SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 28 n-ro 3(125) 30.05.1977. |

# SCIENCO PRI LA SINDEFENDO

(J.NOVÁK KAJ ŠPIČKA, PRAHA,ĈEĤOSLOVAKIO)+/

Scienco penetras iom post iom en ĉiujn sferojn de la homa agado. Ne mirindas do, ke sciencaj metodoj estas aplikitaj eĉ en la kampo de la sindefendo [1-7]. Celo de tiu ĉi artikolo estas informi la legantojn pri iuj novaj scioj el tiu ĉi scienca branĉo, kiuj estus kaŭze de lingvaj barieroj por ili alie neatingeblaj.

Se ni parolas pri kio ajn, por malebligi miskomprenon estas necese antaŭe interkonsenti pri senco, en kiu ni uzados bazajn terminojn. Certe la plej baza termino en la scienco pri la sindefendo estas la "sindefendo-situacio".

Kiel rezultas jam el la nocio, temas pri la situacioj, en kiuj oni devas iel defendi sin kontraŭ perforto, kies inicianto estas iu alia homo. Tamen tiu sola difino ne sufiĉas. Se interbatiĝas du ebriuloj aŭ se batalas du sportistoj, ĵudistoj, karateistoj aŭ boksistoj, ili ankaŭ defendas sin kaj frontas kontraŭ la perforton; malgraŭ tio tiujn ĉi situaciojn oni certe ne nomos la sindefendo-situacioj. La diferencon, kiun oni ĉi tie sentas, ni povas esprimi tiel, ke en la sindefendo-situacioj la celoj de la batalo estas pli gravaj ol en la sportbatalo aŭ en pli malpli instinkta interbatiĝo

+/Ing. J. Novák, Stroupežnického 22, 150 00 PRAHA 5, Ĉeĥoslovakio

de du ebriuloj. Ni taksas la situaciojn kiel la sindefendo-situaciojn nur tiam, kiam la motivoj de la batalo etike justigas la defendanton[1] batali eĉ se li scias, ke li povas eventuale senvivigi la kontraŭulon kaj ke la kontraŭulo ne hezitos damaĝi lian sanon kaj eĉ mortigi lin.

Ĉi tiu determino estas tre grava. Kiel sindefendo-situacion ni do ne taksas, kiel estas evidente, interbatiĝon, kiu evoluis el negrava kverelo ktp. En ĉiuj similaj situacioj ne estis necese uzi perforton kaj sekve de tio oni ne povas justigi eventualan malprosperon, kiun povas suferi unu el la batalantoj. Kaj la uzo de kiu ajn efika batalago kunportas neeviteble ĉi tiun riskon.

Krom la sindefendo-situacioj ekzistas ankaŭ situacioj, en kiuj la kontraŭulo uzadas ja ankaŭ perforton, sed karaktero de tiu ĉi perforto ne estas tia, ke ĝi endanĝerigus la sanon aŭ la vivon de la defendanto. Sekve de tio ankaŭ la defendanto ne estas rajtigita uzi por eligi sian kontraŭulon el la batalo[2] batalrimedojn, kiuj povus la atakanton vundi au eĉ mortigi. La situaciojn de tiu ĉi tipo ni nomas sinprotekto-situacioj kaj la fakon, kiu okupiĝas pri solvado de la sinprotekto-situacioj, la sinprotekto.

La sindefendo estas teoria (t.n. sindefendologio) kaj aplikita (ekzemple la sistemoj de la sindefendo MS-1 [6], OS-1 [7] kaj t.n. monosignala sindefendo [3] . Simile ankaŭ la sinprotekto.

La sindefendologio okupiĝas pri studado de tipoj de batalagoj, taktiko, ekzercaj metodoj kaj pri t.n. mensa sinpreparo. La mensa sinpreparo estas la fundamenta parto de la sindefendologio. Ĝi certigas, ke la psika stato de la defendanto en la batalo aŭ en pretendaj vivsituacioj estu optimuma, do ke ne aperu la nedezirindaj psikaj statoj kiel ekzemple kolero, timo, ktp. La aplikita sindefendo kontraŭe ĉiam konsistas el certa aro da oportune elektitaj batalagoj kaj procedoj, servantaj por apliki tiujn ĉi batalagojn en la praktiko, relative sendanĝere por la defendanto.

La sindefendo (sinprotekto) entenas batalon de unu defendanto kontraŭ unu atakanto, unu defendanto kontraŭ grupo da atakantoj, grupo da defendantoj kontraŭ grupo da atakantoj kaj fine la batalon de grupo da defendantoj kontraŭ unu atakanto. Sub la termino "grupo" ni komprenas en la sindefendologio tiom da batalantoj, kiujn povas estri unu komandanto senpere, do sen helpo de subordigitaj komandantoj.

La batalo povas okazi tage, nokte kaj en diversaj tipoj de tereno. Ĉiujn ĉi speciojn de la batalo oni devas speciale studi [4-7].

Grava parto de la sindefendologio (sinprotektologio) okupiĝas, kiel ni jam menciis, pri metodoj de elbataligo de la atakanto. Ni nomas ĝin batalagologio. En la batalagologio oni studas eblecojn de elbataligo de atakanto

- sen uzo de armiloj
- per uzo de
  - pafarmiloj (plejparte per pistolo)
  - nepafarmiloj (per tranĉilo, bastono,...).

Se oni uzadas - por eligi la kontraŭulon el la batalo - armilojn, oni povas elbataligi lin per

1. FRAPOJ[3]
   - 1.1. BATOJ (oni realigas ilin per la supra membro aŭ ĝiaj partoj, eventuale per aliaj partoj de la homa korpo, escepte de la gamboj)
   - 1.2. KIKOJ [8] (oni realigas ilin per la gambo aŭ ĝiaj partoj)
2. LUKTUMOJ[4]
   - 2.1.FALIGUMOJ (batalagoj, per kiuj oni ĵetas kontraŭulon teren)
   - 2.2.ROMPUMOJ (batalagoj, per kiuj oni celas aŭ teni la kontraŭulon en senpova pozicio, aŭ elartikigi lian membron)
   - 2.3.STRANGOLUMOJ (batalagoj, per kiuj oni strangolas la kontraŭulon)
   - 2.4.TENUMOJ (batalagoj, per kiuj oni tenas kontraŭulon en senpova pozicio (stato) sen helpo de rompumoj)

Unu el tre gravaj taskoj de la batalagologio estas, dedukti
ĉiujn imageblajn batalagojn de koncernata tipo (do ekzemple ĉiujn
frapojn, rompumojn ktp.). Se oni ne scias ĉiujn batalagojn de cer-
ta tipo, kiuj povas ekzisti, oni memkomprene ne povas elekti el ili
la plej bonajn por la bezonoj de la praktiko kaj plue, oni ne povas
krei stabilan kaj sistemecan terminaron. Kaŭze de tio oni dediĉis
grandan penon al tiu ĉi celo [9,10]. Por ke oni povu dedukti ĉiujn
imageblajn batalagojn de iu tipo, estas necese, ke ekzistu limigita
nombro da bazaj konstruaj elementoj, el kiuj oni povas eliri. Natu-
re ankaŭ la nombro de konstruaj principoj devas esti oportune limi-
gita, alie estas la tasko nesolvebla. Kiel ni montris jam pli frue
[4,9,10,11], la bazaj konstruaj elementoj por kreado de frapoj aŭ
rompumoj ekzistas nur tri; la situacio ĉe la faligumoj estas pli
komplika [12], ĉar ĉi tie ekzistas jam pli granda kvanto da bazaj
konstruaj elementoj kaj principoj, sed ankaŭ ĉi tie estis la tasko
sukcese solvita.

Tre interesa parto de la sindefendologio estas taktiko. Ĝi el-
iras el la postulato, ke *la rezulto de la batalo dependu kiel eble*
*nur de la agado fare de la defendanto* [3-7]. La taktiko en la sin-
defendologio do studas, en kioma grado tio estas ebla, kiam kaj ki-
amaniere.

La t.n. mensa sinpreparo estas ja grava parto de la sindefen-
dologio, tamen ĝia signifo transkreskas limojn de nura sindefendo
kaj en siaj konsekvencoj penetras la tutan homan vivon. La homo,
kiu ne kapablas regi sin, ne povas solvi estiĝantajn situaciojn pru-
dente. Sekve de tio li ne estas kapabla direkti la evoluon de situ-
acioj laŭ siaj celoj. Rolon de la mensa sinpreparo en la sindefen-
do ni demonstros en ekzemplo. Ni supozu, ke atakanto komencas en-
danĝerigi la defendanton per tranĉilo sur ŝtonoriĉa arbara vojo.
Kion faros la defendanto? Se li ne estas bone mense preparita, li
plej verŝajne ektimos, komencos tremi kaj li estos tute malkapabla
fari ion por defendi sin. Sekve de tio la atakanto vundos aŭ eĉ mor-
tigos lin. Kial? Pro principa neeblo de la defendanto defendi sin?
Certe ne. Se la defendanto estus malvarmsanga kaj racie pensanta,
li povus enmanigi ŝtonon kaj per ĝi endanĝerigi la atakanton. La a-
takanto devus elekti: aŭ provi ekataki la defendanton kaj riski si-
an malvenkon (li estus plej verŝajne elbataligita per ĵetita ŝtono),

aŭ foriri kaj fini la batalon. Estas videble, ke racie pensanta defendanto povis kun minimumaj batalrimedoj atingi akcepteblan rezulton en la situacio, kiu unuavide ŝajnis por li tre maloportuna.

En tiu ĉi informa artikolo ni ne povas diskuti la sindefendologion aŭ ĝian parton, la batalagologion, pli profunde. Tion ni intencas fari en serio da artikoloj, en kiuj ni pritraktos komence specojn de frapoj, rompumoj kaj faligumoj, poste la taktikon kaj fine la metodojn de la mensa sinpreparo.

---

1) La terminon "defendanto" ni uzas ĉiam por tiu el la batalantoj por kiu ni konstruas algoritmosimilajn procedojn cele al venko. Male, la "atakanto" estas ĉiam tiu el la batalantoj, kiu suferu malvenkon.

2) Eligi la kontraŭulon el la batalo = elbataligi la kontraŭulon.

3) Ĉiuj terminoj, kiujn oni ne povas trovi en [8,13], estas nature nur proponitaj.

4) La luktumoj estas la batalagoj, kiuj ne havas karakteron de la frapo. La luktumojn oni uzadas ekzemple en la sporta ĵudo aŭ lukto.

Resumo

SCIENCO PRI LA SINDEFENDO

(J.Novák kaj Špička, Praha, Ĉeĥoslovakio)

La aŭtoroj difinas en sia artikolo novan sciencan fakon, sciencon pri la sindefendo, kiun ili nomis sindefendologio. La sindefendologio traktas genezon, produktadon kaj solvadon de t.n. sindefendo-situacioj. La parton de la sindefendologio, kiu okupiĝas pri la batalagoj de la sindefendo, oni nomas batalagologio.

LITERATURO

(1) Ŝpiĉka I., Novák J.: Teor. a Praxe těl. Vých. 11,11,493 (1963).

(2) Ŝpiĉka I., Novák J.: Proceedings 1. International Congress of Psychology of Sport, Rome 1965.

(3) Novák J.,Ŝpiĉka I.:Uvod do teorie monosignalni sebeobrany, STN, Praha 1966 (broŝuro)

(4) Ŝpiĉka I.,Novák J.:Moderní sebeobrana,Naše vojsko, Praha 1969.

(5) Ŝpiĉka I., Novák J.: Kapitoly o sebeobraně, Naše vojsko, Praha 1971.

(6) Novák J., Ŝpiĉka I.: Úvod do taktiky sebeobrany MS-1, Olympia, Praha 1973 (broŝuro).

(7) Müller J.: Belŝán B., Ŝpiĉka I., Novák J.: Příručka sebeobrany QS-1, Naše vojsko, Praha 1973.

(8) Ujlaky-Nagy T.:La sporta lingvo en Esperanto,HEA,Budapest 1972.

(9) Novák J.,Ŝpiĉka I.: Úvod do teorie úderù, OV ČTO, Ústi n. Labem 1973 (broŝuro).

(10) Novák J., Ŝpiĉka I.: Druhy úderù (broŝuro, estas presata).

(11) Novák J.,Ŝpiĉka I.: Druhy pák,díl I.(broŝuro, estas presata).

(12) Novák J., Ŝpiĉka I.: Teorie džuda, Olympia, Praha 1971. (broŝuro).

(13) Waringhien G.kaj la kol.:Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, SAT, Paris 1970.